

La libro *Les Patries* de Jean Diedisheim
Claude Gacond, 200-a radioprelego, 1967.08.09 & 1967.08.12

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni raportis pri apero de libro titolita *Les Patries [La Patrioj]* verkita de Jean Diedisheim. La temo de tiu libro okupas larĝan lokon en la priokupoj de la esperantistoj, pro tio ni detalege resumos kaj eĉ longe citos tiun verkon.

A.- Jean Diedisheim estas tre konata en la rondoj de la mondfederalismo. Lia libro *Les Patries [la Patrioj]* estas eseo cent-sesdek-paĝa, kiu nove prilumas la temon kolizio de la patriotismoj. Ĝin eldonis *La Baconnière* en Neuchâtel, Svislando.

Cl.- Hodiaŭ interesos nin la enkonduko. Jean Diedisheim rememorigas la celon de la Unua Konferenco en Hago en 1898 citante noton sendita de la cara registaro al la tiamaj registaroj. Aŭdu ĝin :

A.- « *Haltigi la senĉesan armadon de la popoloj kaj preventi plagojn, kiuj minacas la tutan mondon.* »

Cl.- Pri tiu programo Jean Diedisheim diras :

A.- « *Ĝi enhavis celon kaj profetaĵon. La celo ne estis atingita, la profetaĵo efektiviĝis superante ĉion imageblan.* »

Cl.- Ligo de Nacioj kaj la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj estas institucioj tro komplikaj kaj supraĵaj, kiuj fakte nur estas Konferenco de diplomatoj. Ili havis neniam la kapablon ĉesigi la armadan konkurson kaj garantii la sekurecon de la internacia societo.

A.- Kiam la naciaj interesoj estas tuŝataj, la registaroj neniam hezitis subite kaj unuflanke rompi siajn plej firmajn promesojn. Senmoraleco regas en la internacia societo. Jen listo de la ĉefaj rompoj de paktoj de post la fondo de Ligo de Nacioj ĝis antaŭ dek jaroj :

Cl.- 1932 : Japanio malobservas la pakton de Ligo de Nacioj kaj subite aneksas Manĉurion.

A.- 1936 : Italio malobservas la saman pakton kaj atakas Etiopion.

Cl.- 1936 : Germanio ekmalobservas la Versajlan traktaĵon. Ni konas la konsekvencojn.

A.- 1939 : Ĉiuj grandaj ŝtatoj malobservas la pakton Briand-Kellog, en kiu milito estis proklamita eksterleĝa de sesdek registaroj, tio en 1928, do nur dekunu jarojn antaŭe.

Cl.- 1954 : Britio malobservas la britan-sovetan traktaĵon ;

A.- kaj Francio malobservas la francan-sovetan traktaĵon ;

Cl.- kaj Usono malobservas la potsdamajn akordojn.

A.- 1956 : Egiptio malobservas la Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj kaj atakas Israelon.

Cl.- Kaj Britio malobservas la saman Ĉarton atakante Egiption :

A.- kaj Francio same.

Cl.- La nacioj volas memsolvi siajn konfliktojn. Por ili la riĉigo de arsenaloj estas pli dezirinda, ol la starigo de funkcikapabla mondregistaro kaj perfektigo de superregistara mondtribunalo.

A.- La riskoj al monda konflikto, en kiu intervenus la termonukleaj armiloj, kreskas jaron post jaro. Nur timo de tiu povego malkuraĝigas la batalemulojn. Sed tiu malkuraĝiga forto efikos, ĝis kiam unu grandpotenco kredos sin plej forta aŭ timos la intervenon de la kontraŭulo.

La libro *Les Patries* de Jean Diedisheim
Claude Gacond, 200-a radioprelego, 1967.08.09 & 1967.08.12

Cl.- La publika opinio ne reagis kaj akceptas la eventualecon de konfliktoj, kiuj malaperigas tutajn civilizojn.

A.- La homo al kutimiĝis tre rapide al eksterordinaraj teknikaj kaj sociaj ŝanĝoj. Sed la sama homo ne povis ŝanĝi sian pensmanieron. Li ne povas akcepti forlasi la dogmon pri la nacia suvereneco.

Cl.- Dum la homgrupoj fariĝas ĉiam pli interdependaj, la ŝtatoj volas resti absolute suverenaj entoj. Tiu nacia egocentrismo kondukas la homaron al absurda situacio.

A.- La nocio **ŝtato** aŭ **nacio** kunfandiĝis dum la franca revolucio kun alia nocio, tiu pri **patrio**. Tiu konfuzo permesas al la registaroj uzi la emociigan enhavon de la nocio **patrio** profite al la soci-jura koncepto **ŝtato-nacio**.

Cl.- Naciaj armeoj anstataŭis metiajn soldatarojn kaj la armeo fariĝis la personigo de la nacio.

A.- Tio multigis la tutpovecon de la armeo.

Cl.- Dum strukture ĉio evoluis, la ŝtatoj rifuzas evolui. Kaj la progreso de la tekniko ilin servas, anstataŭ servi forton supernacian. El tio danĝero pri eksterminado.

A.- La ŝtatoj pro sia naturo estas nekapablaj elimini la militdanĝeron. Ili nur povas funkciigi publikajn servojn kun funkciuloj, policanoj, juĝistoj, prefektoj, inĝenieroj, instruistoj, tio interne de la nacio.

Cl.- Sed por la komercaj interŝtataj ŝanĝoj, la helpo al la subevoluintaj regionoj, la defendo de la loĝantaroj kontraŭ la premoj de aliaj nacioj, la naciaj registaroj estas nekompetentaj.

A.- Fariĝas evidente, ke instanco, kiu nek por la studoj, nek por la decidoj dependus de la koncernataj ŝtatoj, estus pli efika, ol internacia grupiĝo de reprezentantoj de ŝtatoj, kiuj ne volas evolui.

Cl.- Ni devas transpaŝi la eraon de la strikte naciaj kompetentecoj kaj alpaŝi al solida aranĝo de nia planedo.

A.- Aŭ, se ni ne kapablas fari tiun alpaŝon, ni estas kondamnitaj daŭre kaj delire pretigi metodon racian kolektivitan trian mondmiliton.

Cl.- Tiu enkonduko de *Les Patries* [*La Patrioj*] de Jean Diedisheim rememorigas la leganton, ke fakte ni staras antaŭ tiuj sociaj alternativoj. Aŭ kune konstrui la mondon, aŭ kune pretigi nian morton.

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos la prezenton de tiu eseo pri la kolizio de la patriotismoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-